

La libro de la mil kaj unu noktoj

La libro de la mil kaj unu noktoj estas **ĉefverko de la monda literaturo**. Tio estas ampleksa kolekto de rakontoj, kiuj venis al ni tra la jarcentoj.


La tradukinto aldonis, komence de la libro, klarigojn pri la titolo de la libro, pri la traduko de la propraj nomoj kaj pri kelkaj specifaj terminoj. Li ankaŭ aldonis etan biografion de Antoine Galland kaj prezenton de la ĉefaj eldonoj de la 1001 noktoj. Said Baluĉi verkis la antaŭparolon.

La traduko de Daniel Moirand estis kontrolita de Rob Moerbeek (Nederlando) kaj de Romano Bolognesi (Italio). Poste Rose-Marie Quintin (Francio) kontrolis la tutan tekston. Kiam Espéranto-France komencis labori pri la eldono, Marie-Roza kaj Pascal Vilain (Francio) denove kontrolis la tuton. Lastan kontrolon denove faris Pascal Vilain kaj Said Baluĉi.

Entute **1600 pàgoj** en **3 volumoj**.

La rakontoj estas **ilustritaj per 430 desegnoj**, kiuj venas de la eldono publikigita de Hachette (Parizo) en 1865. Ilin desegnis Gustave Doré, Castelli, Foulquier, Gustave Roux, F. Pierdon, ktp.

La libro estas parto de la *Serio Oriento-Okcidento de UEA*, sub la numero 63.



Leĝa depono: majo 2024 (La libro estos disponebla ekde la 8-a de majo 2024)

Volumo 1 : 538 paĝoj. ISBN 978-2-9578961-5-8

Volumo 2 : 536 paĝoj. ISBN 978-2-9578961-6-5

Volumo 3 : 538 paĝoj. ISBN 978-2-9578961-7-2

Formato: A5 (148 x 210 mm)

Publika prezo en Francio: 29 € (ĉiu volumo)

La libron vendas Esperanto-France en sia retbutiko: <https://butik-esperanto-france.org/> (eblas antaŭmendi en aprilo 2024, kun speciala oferto ĝis la 20-a de aprilo 2024)



kaj ĉe lulu.com: <https://www.lulu.com/spotlight/esperanto-france/> (ekde la 8-a de majo 2024)

Prezento en la 4-a paĝo de la koverto:

La Libro de la Mil kaj Unu Noktoj estas ampleksa kolekto de rakontoj, kiuj venis al ni tra la jarcentoj.

Danke al Antoine Galland, kiu tradukis kolekton de ĉi tiuj rakontoj en la francan komence de la 18-a jarcento kaj, tri jarcentojn poste, al Daniel Moirand, kiu esperantigis ilin, ankaŭ vi povos sperti tiujn mirindajn rakontojn, tiujn fabelojn kaj fablojn, tiujn rakontojn ene de rakontoj, kiuj transportos vin al diversaj orientaj landoj en diversaj epokoj, kiel ĉiunokte faris Ŝeherezad (Ŝahrzad) por vekti la scivolemon de la sultano (ŝaho) kaj eskapi sian fatalan sorton.

Kelkaj paĝoj el la libro:

<p>76 La libro de la mil kaj unu noktoj</p>  <p style="text-align: center;"><i>Sahriar kaj Ŝeherezad</i></p> <p>min. Mi povus rakonti al vi multajn aliajn, kiuj konvinkus vin, ke vi ne devas oponi mian intencan. Cetere, pardonu min se mi aŭdacas deklari tion, vi vane oponus: eĉ se la patra tenereco rifuzus akcepti la peton, kiun mi metas al vi, mi mem irus prezenti min al la sultano.</p> <p>Fine la patro tedita de la firmeco de sia filino, cedis antaŭ ŝia insisto, kaj kvankam li estis tre afliktrita, ĉar li ne kapablis devigi ŝin de tiom pereiga decido, li tuj iris al Sahriar por anonci al li, ke la venontan nokton li kondukos al li Ŝeherezad-on.</p> <p>La sultano estis tre mirigita pro la ofero, kiun la ĉefveziro proponas al li.</p> <p>– Kiel vi kapablis, li diris, decidigi vin liveri vian propran filinon?</p> <p>– Senjoro, respondis la veziro, ŝi mem proponis sin. La malĝoja sorto, kiu atendas ŝin ne kapablis timigi ŝin kaj pli ol sian vivon, ŝi preferas la honoron fariĝi dum unu nokto la edzino de Via Moŝto.</p>	<p style="text-align: right;">77 Fablo pri la azeno, la bovo kaj la plugisto</p> <p>– Sed ne eraru, veziro, reekparolis la sultano: morgaŭ, kiam mi metos Ŝeherezad-on en viajn manojn, mi volas, ke vi forprenu ŝian vivon. Se vi tion ne faros, mi juras al vi, ke mi mortigos vin.</p> <p>– Senjoro, respondis la veziro, mia koro certe ĝemos, kiam mi obeos vin, sed kiom ajn grumblos la naturo, kvankam mi estas patro, mi asertas, ke mia brako estos fidela.</p> <p>Sahriar akceptis la proponon de sia ministro kaj diris al li, ke li mem kondukos sian filinon, kiam tio plaĉos al ŝi.</p> <p>La ĉefveziro iris por anonci tion al Ŝeherezad, kiu akceptis ĝin kun tiom da ĝojo kvazaŭ ĝi estus la plej agrabla en la mondo. Ŝi dankis sian patron ĉar li tiel favore kompleksis al ŝi, kaj vidante, ke li estas tre afliktrita pro doloro, ŝi diris por konsoli lin, ke ŝi esperas, ke li ne pentos, ĉar li edzinigis ŝin kun la sultano, kaj ke male, li devos ĝoji pri tio dum la cetero de sia vivo.</p> <p>Ŝi nur pensis pri tio, kiel aperi antaŭ la sultano; sed antaŭ ol foriri, ŝi aparte ekparolis kun sia fratino Dinarzad kaj diris al ŝi:</p> <p>– Mia kara fratino, mi bezonas vian helpon en tre grava afero; mi petas vin ne rifuzi tion al mi. Mia patro baldaŭ kondukos min al la sultano, por ke mi fariĝu ties edzino. Tiu novaĵo ne teruru vin, nur pacience aŭskultu min. Tuj kiam mi estos kun la sultano, mi petegos de li la komplezon, ke vi dormu en la nupta ĉambro, por ke mi ĝuu ankoraŭ dum tiu nokto vian ĉeston. Se mi ricevos tiun favoron, kiel mi esperas, memoru vekti</p>  <p style="text-align: center;"><i>Dinarzad</i></p>
--	---

Legu kelkajn paĝojn en <https://esperanto-france.org/IMG/pdf/1001-noktoj-t1-extrait.pdf>